

Heinrich Heine,
La montvoĉo

tradukita de Manfredo Ratislavo

Rajdant' malĝoje trotras tra
Montval' sen iu cel':
Aĥ, ĉu mi nun iras al karulin',
Aŭ ĉu al la tomb-malhel' ?
De l' val' resonis el:
Al tomb-malhel'!

Kaj peze ĝemas la rajdant',
Kaj diras li al si:
Do iru vi al via tomb' -
En ĝi ripozos vi.
Respondas voĉo ĉi:
Ripozos vi!

Kaj larmo rulas de lia vang'
Pro veo en la kor':
Trankvilon mi trovos en la tomb' -
En paco kaj sen dolor'.
Reeĥas el la for':
Kaj sen dolor'!

*Traduko de la Germana poemo "Die Bergstimme" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 1984.*

MR-118-1 / Arg-209-418 (2004-03-14 00:10:54)

La poemo troviĝas en la „Libro de la kantoj“, sekcio „Junaĝaj suferoj – romanoj“, n-ro II.